



Unum ovile et unus pastor.
Unu ŝafejo kaj unu paŝtanta.
(JOH., X, 16.)

ESPERO KATOLIKA

INTERNACIA MONATA GAZETO, OFICIALA ORGANO de I. K. U. E.

LA MONAĤOJ DE CALDEY.

Antaŭ ol mi komencas tiun ĉi mallongan historieton de vera religia aventuro de la dudeka centjaro, mi volas klarigi al miaj legantoj, ke la herooj de mia rakonto ne estas katolikoj, sed anglikanoj. Do kiam mi parolas libere pri episkopoj, pastroj, Benedikta Ordena, monaĥoj k.t.p. oni devas kompreni, ke tiuj vortoj ne estas tie ĉi uzitaj laŭ la ordinara kaj katolika senco.

Ĉar la Bulo *Apostolicae Curae* de la Papo Leono XIII montras klare al ĉiuj katolikoj, ke la protestanta eklezio de Anglujo ne havas veran sacerdotaron.

La legantoj de Espero Katolika tre bone scias, ke ekzistas en Anglujo multe da nekatolikoj, anoj de la ŝtateklezio, kiuj pli kaj pli sopiras reveni al la fideleco al la Apostola Seĝo. Dum longa tempo la pli piaj Anglikanoj kutimiĝas kredi preskaŭ ĉiujn katolikajn dogmojn kaj praktiki en sennombraj detaloj la katolikan vivmanieron laŭ sia oportuno kaj povo. Inter aliaj aferoj ili longe penadas rekomenigi inter si la religian vivon, tiel perforte detruitan de la malbona reĝo Henriko VIII.

En la unua tempo la episkopoj protestantaj malaprobis

tiujn penojn reakiri la glorojn de la estinto, sed iom post iom ilin venkis la sindoneco kaj entuziasmo de la novaj religiuloj. Sub la saĝa gvido de la kondukantoj de la alroma movado, la doktoroj Pusey kaj Neale kaj iliaj postuloj, ekestis aroj da virinoj vivantaj sub simpla regularo kaj farantaj simplajn votojn. Pli poste formiĝis similaj aroj da viroj, ĉiuj okupataj pri aktivaj bonfaroj, ekz. la Societato de S. Johano Baptisto ĉe Cowley apud Oxford, kaj la Ordeno de la Reviviĝo de nia Sinjoro ĉe Mirfield.

Ĉiuj tiuj societatoj estis tute novaj; ĉiu estis kreita por iu speciala nuntempa bezono, kaj ĉiuokaze la celo estas tute praktika. Ili celas la aktivan vivon sub la protekto de regula preĝado. Tio ne estas mirinda; car la angla karaktero estas speciale praktika kaj agama, kaj ankaŭ la protestantoj ĉie ne povas kompreni la utilecon de la vivo de meditado.

Tamen de tempo al tempo la deziro movis unu kaj alian entrepreni taskon multe pli malfacilan. Ĉu oni povus redoni al la anglikana eklezio la veran kontempleman vivon? Ĉu oni povus restarigi la Benediktan Ordenon? La nea respondo al tiuj demandoj ŝajnus konfeson, ke la Reformacio en Anglujo vere sukcesis en sia malbonfaranta laboro, kaj detruis la katolikan karakteron de la eklezio. Kaj tion granda parto de miaj landanoj absolute rifuzas konfesi. La katolikoj ĉiam insistas, ke protestanta institucio ne povas doni la fruktojn de la sankta vivo. La katolikemaj anglikanaj respondas, ke la tempo kaj la pacienco solvos ĉiujn tiajn problemojn. La historio de Caldey estas la praktika respondo al tiuj demandoj.

Kompreneble la monaĥoj de Caldey ne estis absolute la unuaj protestantoj, kiuj penis vivi laŭ la Benedikta Regularo. La bonekonata „Patro Ignacio” kaj aliaj kuraĝuloj preparis la vojon, kaj iliaj eraroj kaj neprudentaĵoj estis utilaj kiel konduliloj kaj admonoj al iliaj posteuloj. Sed la monaĥoj de Caldey sukcesis ricevi la aprobon de la Anglikanaj aŭtoritatuloj de l' komenco de la entrepreno, kaj ili sole malsukcesis tial, ke la ŝtateklezio ne povas toleri la plenan religian sistemon de la Katolika Eklezio.

En la nuna artikolo mi proponas rakonti mallonge la historion de la monaĥoj de Caldey kaj ilia granda entrepreno; en alia mi esperas daŭrigi la historion kaj diri kiel ili trovis la vojon en la veran ŝafejon.

Sed en la unua loko mi volas citi la vortojn, kiujn mi ĵus legis sur la unua paĝo de la Historioj de la Benediktoj de la Insulo Caldey; ili estas vortoj de protestanta pastro, sed ili estas vere katolikaj vortoj, kaj ili enhavas la sekreton de Caldey. Jen ili estas:

„Se vi povas preĝi, se vi komencis akiri iugrade la sanktan arton, tiuokaze pro Dio kaj pro homo ne volu fari ion alian. Donu vin entute al tiu laboro: restu sur la monto kun la manoj levataj al Dio, — ne estos manko da batalantoj malsupre, kiuj venkos per viaj propetoj” (Vortoj de D-ro A. W. Robinson).

La komencoj de gravaj aferoj ofte trovas sin en la okazoj de knaba vivo. Unu tagon antaŭ tridek jaroj okazis ke dekdujara knabo vagis en la patran librejon por serĉi ion por sin amuzi.

Li trovis tie kuriozan libron de nekutima speco, titolita „Monaĥoj kaj Monaĥejoj”. Li prenis ĝin, li legis avide, li interesiĝis forte, li komencis revii, ke li iam fariĝos Benedikta monaĥo.

Post longe en la jaro 1892 juna kuracista studento preskaŭ akcidente vizitis la monaĥejon de la (Anglikanaj) Benediktaj monaĥinoj ĉe Twickenham, kiujn ni trovos pli poste ĉe Malling Abatejo, apud Maidstone, kaj ankoraŭ pli poste ĉe Milford Haven. Tiuj sinjorinoj sub la aŭtoritato de D-ro Temple, Episkopo de Londono, jam komencis vivi laŭ la regularo de S. Benedikto en la Anglikana Eklezio.

La juna studento, la dekdujara knabo estas la sama persono, kiu sin nomas Aelred Carlyle.

Li kompreneble demandis sin, se povas ekzisti monaĥinoj de la Benedikta Regularo en la Nacia Eklezio, kial ne povas ankaŭ esti monaĥoj? Efektive ne estas praktike la sama afero. Ĉar unue vira ordeno estas pli formala kaj serioza, malpli eksperimenta; kaj plie, se estos monaĥoj, estos ankaŭ pastroj de la ordeno. La laikoj povas preĝi

kiel ili volas, sed la pastroj estas tute alia afero. Kaj tiel tio estis la provo de la eksperimento.

Nu la kapelisto de la monaĥinaro estis samtempe la estro de malgranda grupo da viroj, kiuj estis jam penantaj vivi laŭ la Regularo de S. Benedikto (Notu ke ĉie ni trovas tiujn mirindajn signojn de la dia graco). En tiun anaron eniris la juna studento sub la nomo de Frato Aelred, kaj tie li ricevis sian unuan sperton de la religia vivo. Sed la eksperimento ne daŭris longe. La grupo baldaŭ disiĝis. En tiu ĉagreno li tute ne perdis kuraĝon. Jam li konatiĝis ĉe Ealing dek junulojn, kiuj partoprenis siajn esperojn kaj ambiciojn. Kun la aprobo de la antaŭnomita kapelisto, tiu ĉi nova anaro luis ĉambron, kie ili kunvenis por preĝado. Kaj post nelonge ili ekposedis domon, kie ili laŭ sia povo vivis kaj preĝis kune, dum ili perlaboris sian ĉiutagan panon en la mondo, kaj ankaŭ helpis la paroĥestron en la paroĥa laboro

En la jaro 1895 Frato Aelred kaj liaj kunuloj ricevis koran inviton de la pastro, iri al la Isle of Dogs (Insulo de Hundoj), kaj sin doni entute al la religia vivo sub ĉiujaraj votoj. Li tre deziris respondi jese al tiu alvoko, sed liaj kunuloj ne povis konsenti kun li pri tio. Fine post zorga pripensado ili disiĝis, kaj Frato Aelred venis al la nova hejmo tutsole.

Mi certe ne kuraĝos kompari tiunĉi bravulon kun la glora Sanktulo Ignacio, tamen oni ne povas studi la vivon de Aelred Carlyle sen memorado de la multaj afliktoj kaj tentadoj de la nevenkebla fondinto de la Jezuitoj. Supozeble ĉiuj, kiuj faras grandan laboron por Dio, bezonas ne sole la donacon de preĝado, sed ankaŭ tiun de persistado. Tia homo estas Aelred Carlyle. Kiel Jakobo li estas „forta kontraŭ Dio” (*contra Deum fortis*) en la kuraĝa frazo de la Sankta Biblio. Li ne sciis esti venkita.

Dum la sekvantaj monatoj li vivis hejme, donante parton de sia tempo al siaj studoj, parton al paroĥa laboro en la Isle of Dogs. Tiu „insulo” estas vere duoninsulo sur la norda bordo de la rivero Thames oriente de Londono. En ĝi oni trovas la ĉefajn ŝipejojn de tiu urbo. Oni povas

imagi, ke la paroĥa laboro en tia distrikto ne estas tre alloga al ordinara persono.

En kvadraĝesimo de l' jaro 1896 li venis loĝi en tiu sama paroĥo kaj sin donis entute al preĝado kaj bonfaroj. La Episkopo Temple de Londono sciigis kaj aprobis sian decidon, kaj ĉe Pasko la bona kapelpastro de la Benediktaj monaĥinoj de Malling (pri kiuj ni jam parolis) akceptis lin kiel „Novulon” en la Kapelo de l' Abatejo. Pro la specialaj cirkonstancoj la Episkopo permesis al li, tuj preni votojn por unu jaro. Post kelkaj monatoj kuniĝis al li alia Novulo.

Je l' fino de l' jaro 1897 Frato Aelred iris al la paroĥestro kaj diris al li, ke la multeco de liaj praktikaj devoj malhelpis lin atingi la veran celon, kio estis vivi precize la Benediktan vivon. Ankaŭ li esperis, ke la tempo alvenis kiam li povos fari sian profesion kiel Benedikta monaĥo. Do la bonkora paroĥestro skribis al la Ĉefepiskopo petante lin, ke li donu intervjuon al Frato Aelred.

La Episkopo Temple nun fariĝis Ĉefepiskopo de Kantuario, kiu estas la plej alta ofico en la Nacia Eklezio. Li ĉiam interesiĝis pri la religia vivo, kaj tial li tre favore ricevis Aelred kaj plene aprobis liajn planojn, kaj donis al li sian benon. Plie post tri tagoj li sendis al li aŭtoritatan permeson, fari profesion kiel Benedikta monaĥo. Tiu solena profesio estis farita en la Kapelo ĉe Malling antaŭ la sama Kapelisto, kiu tiel longe simpatiis kun li, je la 20-a de Februaro, 1898.

Dum kelkaj monatoj Frato Aelred kaj liaj kunuloj vane serĉis konvenan hejmon por sia nova vivo. Multajn semajnojn ili pasigis en la Londona domo de la Cowley Patroj, kaj en la fino de 1889 ni trovas ilin en dometo apud Milton Abbas en la graflando de Dorset, kie ili restis ĝis ili iris al Caldey en Januaro 1901.

Por tiuj, kiuj forkuras de la sendia mondo, kia hejmo pli dolĉa ol insuleto! En Patmos S. Johano vidis la ĉielon malfermita. En Iona kaj Lindisfarno S. Kolumbo kaj S. Kutberto gajnis la konvertiĝon de Angllando per siaj preĝoj senĉesaj. Sed cent jaroj antaŭ kiam S. Kolumbo

venis al Iona, iu Abato Piro preĝis kaj fastis sur la insuleto Caldey. Tien ĉi venis S. Iltyd, religiulo, predikanto kaj instruanto, tien ĉi S. Davido kaj multaj forgesitaj sanktuloj, kies nomoj estas skribitaj en la ĉielo. Tien ĉi ankaŭ pli poste la Normandoj sekvis la Keltojn, kaj de 1120, ĝis 1535 (mizera jaro!) la filoj de S. Benedikto regis kaj preĝis en Caldey. Feliĉa insulo de la plej malproksima okcidento, ĝi estis unu granda altaro de Dio, ĉirkaŭgardata de la nedormanta maro!

Nu antaŭ ol la monaĥoj de S. Benedikto iam venis al Caldey, plaĉis al Dio doni al la Angloj saĝan kaj sanktan reĝon. Kaj en multaj aferoj la reĝo Eduardo la Konfeso ricevis de Dio la donacon de profetado. Do kiam li kuŝis sur la mortlito, multaj kaŝitaĵoj sin rivelis al li en sonĝo, kaj precipe la anĝelo de l' Sinjoro parolis al li pri la punoj kiuj venos kontraŭ la Angla popolo. Kaj la reĝo demandis, ĉu ekzistus ia helpo aŭ savo. Al kiu oni respondis jene:

„Verda arbo detrancita de sia trunko estos apartigita de sia radiko ĝis tri hektometroj, kaj poste sen vira mano ĝi floros kaj fruktodonos kaj post kiam tio okazos eble venos savo.”

Kio ajn estos la vera klarigo de l' sonĝo, tiamaniere okazis al la Eklezio en Anglujo. Ĉar en la jaro 1534 la kruela reĝo Henriko VIII perforte apartigis la Eklezion de la Sankta Seĝo, kaj en 1560 Elizabeto finis la detruadon de la Katolika Religio en Anglujo.

Post 300 jaroj komencis vere la Katolika Reviviĝo, kun la fama predikado de Keble pri la Nacia Apostatiĝo en Julio 1833. En 1845 la unuaj Oxfordaj konvertintoj aliĝis al la Katolika Eklezio, kaj en 1851 la glora Papo Pio IX redonis al Anglujo la Hierarĥion spite la koleraĵojn de la politikistaro.

Pasis pli ol 60 jaroj kaj la Katolika tajdo alfluas ankoraŭ tre malrapide. Tamen senhalte ĝi fluas kaj silente rampas en malproksimajn lokojn kaj forgesitajn sanktaĵojn, kie antaŭe le Meso estis oferata, la sanktuloj faris miraklojn de povo kaj amo. Kaj tiel en la fino ĝi alvenis eĉ al la

soleca insulo Caldey, apud Tenby ĉe la suda de Kimrujo. Kaj jen la rakonto.

En Oktobro 1900 la bienposedanto ĉe Milton Abbas bezonis la dometon, en kiu vivis la Fratoj. Sekve ili devis trovi novan hejmon. Samtempe la Anglikana Pastro Bushell, kiu tiam estis la posedanto de Caldey, skribis al la Fratoj kaj proponis, ke ili uzu dum kelkaj monatoj la ĉambrojn kaj preĝejon de la antikva priorejo en la insulo. Li neniam intencis fari daŭran aranĝon: tion oni tute komprenis. Sed la propono kontentigis la monaĥojn kaj alvokis al ilia amo al la estinto, kaj kun ĝojo en koroj ili kantis la vesperan Diservon je la unua fojo en la antikva preĝejo. Ŝajnis al ili, ke Dio jam redonis la gloron de l' pasintaj jaroj, dum ili kantis la samajn vortojn, kiujn kantis la Katolikaj filoj de S. Benedikto en la sama preĝejo antaŭ tiel multaj centaroj. Sed Dio provizis ion pli bonan por ili, por ke ili ne perfektigu sen ni.

Estante sen mono, la Fratoj penis vivi per laboro en la monaĥejo, kaj dum tiu ĉi tempo ili ofte spertis veran malsaton. Pli poste la posedanto de Caldey bezonis la tutan domon kaj dum ok semajnoj ili devis dormi en tendoj en la arbareto. La vetero estis neordinare pluvema kaj malvarma en tiu jaro. En la fino de Septembro ili povis dankplene reveni al la protektanta tegmento de la domo. Dum multaj monatoj ili preĝis al la bona Dio, ke Li montru al ili sian volon. Fine en la komenco de 1902 ili ricevis inviton de Lord Halifax, veni loĝi en konvena konstruaĵo en Painsthorpe en la graflando Yorkshire.

La leganto komprenos, ke la maltrankvilaĵoj kaj necertoj de tiu periodo grande fortigis kaj unuigis la frataron kaj ankaŭ lernigis ilin esperi en ĉiuj aferoj la fidindan gvidadon de Dio. Paŝo post paŝo ili marŝis al la fina celo sen antaŭvido de la estonto, kaj ĉiutage ili lernis kune novajn lecionojn de konfido kaj pacienco. Tiamaniere por kuraĝigi ilin, la bona mano de Dio kondukis ilin al Caldey, sed kiam Li poste foririgis ilin, la bonuloj akceptis la Dian volon sen duboj aŭ plendoj.

Kaj tiel ni trovas ilin ĉe Painsthorpe en la monato

Marto 1902, liberaj de la maltrankvilaĵoj de la antaŭaj jaroj, kaj sin donantaj al la servo de Dio sen distreco. Ili estas jam naŭ, kaj la nombroj grade plimultiĝas. Kun la aprobo de la Ĉefepiskopoj de Kantuario kaj de Jorko, ili elektis Frato Aelred kiel Abato, kaj illi ricevis de Kantuario la Konstitucion (Charta) de la Monaĥaro.

En tiu dokumento la Ĉefepiskopo de Kantuario donis sian plenan sankcion al ĉio, kion ili faris, kaj al ilia observado de la Sankta Regularo de S. Benedikto. Nu la Ĉefepiskopo Temple estis saĝa kaj singardema reganto, kiel ĉiu anglo scias, kaj certe li antaŭvidis, ke gravaj malfacilaĵoj povos okazi en la estonto pri la letero kaj la spirito de la Benedikta Regularo, kaj li sendube opiniis, ke estos pli saĝe riski tiujn danĝerojn ol subpremi ĉiun entuziasmon kaj piecon en la ŝtateklezio. Sed li estis maljunulo, kaj lia posteulo eble ne sentus sin devigita sekvi en la sama vojo. Kaj estas juste memori, ke antaŭvidi malfacilaĵojn ne estas la sama afero, kiel venki ilin.

Ni ne povas dubi, ke la Ĉefepiskopo bone sciis, ke la monaĥoj preĝis laŭ la Benedikta Breviario. Kompreneble ĉiu scias, ke kelke da anglikanaj pastroj uzas la (ordinaran) Breviaron, sed tion la episkopoj ne povas facile malhelpi. Sed uzi la Breviaron kun ĉiuj Oficioj de la Sanktuloj sub Regulo kaj episkopa aŭtoritato, tio estas stranga afero en la protestanta eklezio! Kion pri la anglikanaj monaĥinejoj? vi eble demandos. Nu en la plimulto el tiuj (ne en ĉiuj) oni uzas Oficiojn zorge preparitajn per la forigo de la Ave Maria kaj la neanglikanaj Festoj k.t.p.

Sed en la Caldey afero la Ĉefepiskopo Temple simple rifuzis iri renkonti malpacon. Li fermis la okulojn kaj benis la monaĥojn. Kaj en 1903 li mortis.

La nova Ĉefepiskopo de Kantuario, nomata Davidson, estas viro de alia speco, kaj la monaĥaj tuj sentis, ke ili perdis amikon. Sed nun ili vivis en la diaceso de la Ĉefepiskopo de Jorko, kaj ili senhezite turnis sin al li, kaj trovis lin plena je bonkoreco kaj bonvolo. Ĝis nun ili ne havis pastron de sia Ordeno. Ekzistis kialoj, pro kio ne estis dezirinde, ke la Abato pastrigu en Anglujo laŭ la

anglaj leĝoj. Tial la Ĝefepiskopo Maclagan (de Jorko) sendis Abato Aelred al la Episkopo Grafton de Fond du Lac en Usono, kiu faris lin pastro laŭ la Anglikana Ceremonio.

La jaroj, kiujn ili pasigis ĉe Painsthorpe estis kvietaj kaj trankvilaj kaj plenaj de gracoj, kiuj pretigis ilin por la estonto. Post longe venis al ili la neantaŭvidita anonco, ke oni intencas vendi la karan insulon Caldey. Kaj tiu anonco estis akompanita per alia eĉ pli mirinda; la aĉetonto de Caldey proponis prezenti ĝin al la monaĥoj de Painsthorpe. En tiuj aferoj ĉio ĉiam iras malrapide, kaj multaj monatoj pasis antaŭ ol oni finis la negocadon; sed ĉirkaŭ la fino de Septembro, 1906, la monaĥaro fariĝis la vera posedanto de la tuta insuleto.

La monaĥaro forlasis sian amatan hejmon en Painsthorpe en Oktobro 17, oferinte al la bona Dio en la paroĥa preĝejo siajn lastajn dankojn pro tiel multaj benoj. Ĉeestis Lord Halifax, kiu ĉiam estis tiel helpema kaj donema, kaj multe el la paroĥanoj, kaj la adiaŭoj estis vere kortuŝantaj. Tamen ilia ĝojo estis pli granda ol ilia malĝojo. Ili venis naŭ, kaj ili foriris dek-ok; kaj ŝajnis al ili, ke la grandaj esperoj, kiuj movis ilin, tuj estas plenumotaj, sed nia Dio estas Dio, kiu kaŝas sin. Vere la Caldey-anoj povas diri, — *„In mari via tua, et semitae tuae in aquis multis: et vestigia tua non cognoscentur.”*

Lasinte Paidsthorpe, la Fratoj vojaĝis la tutan nokton kaj alvenis al Tenby frumatene en la festo de S. Luko. Enirante la vaporŝipon, ili tuj ekvidis la tutan loĝantaron de l' insulo venanta renkonti ilin. Procesio sin formis sur la krutaĵo, kaj ĉiuj akompanis la Fratojn al la preĝejo, kantante la *Deprecamur* kaj la litaniojn, kiujn kantis S. Aŭgustino kun siaj monaĥoj, kiam ili marŝis al Kantuario antaŭ tridekcentjaroj. Tiel kun pento kaj danko la monaĥoj ekposedis la insulon de Sanktuloj en la nomo de S. Benedikto kaj al la gloro de Dio.

Pri la vivo en Caldey en la daŭro de la sekvantaj ses jaroj ni ne havas skribitan historion, krom tio, kion oni povas eltrovi en la paĝoj de la gazeto *Pax*, kiun eldonis la Fratoj. Ni scias, ke ili daŭris preĝi diligente kaj observi

sian Regularon kun fervoro kaj severeco. La beno de Dio restis sur ili, kaj ilia nombro kaj influo pligrandiĝis. Multaj anglikanaj pastroj kaj junuloj vizitis la gastejon de tempo al tempo. Oni diras, ke la verketo de la Abato, titolita „Nia Celo kaj Metodo”, tre plaĉis eĉ al la Katolikaj Benediktoj. Kaj la katolikemaj Anglikanoj ĝoje kriis: „Jen vi vidas, kion la Anglikana Eklezio povas fari!”

Sed en la daŭro de tiuj jaroj komencis fariĝi persista demando en la koroj de la Caldey monaĥoj — „Kion vi faras tie ĉi? Kial vi ne obeas la Estron de la Krista Eklezio? Per kiu aŭtoritato vi faris, kion vi faras?,” Ne sole al aliaj homoj, sed eĉ al si mem, ili ŝajnis esti balanciĝantaj inter du sistemoj, prunteprenantaj Breviarion kaj Meslibron kaj Regularon de Romo, kaj samtempe penantaj tenadi sian lokon en la „Eklezio de Anglujo.”

Al tia problemo ekzistas sole unu respondo. Sed ne facile atingis ĝin tiuj sindonemaj homoj. Oni diras, ke la antikvaj Romanoj opiniis tiun viron esti heroo, kiu rifuzis malesperi pri la Respubliko. Tiu ideo eble klarigos al ni la lojalecon de Anglikanoj al institucio, kiu tute ne meritas ĝin. Tiuj nobluloj povis konfesi eraron, ili povis submeti sin al la Dia volo, sed ili trovis, ke estas preskaŭ neeble malesperi pri sia eklezio. Tio estas la vera kaŭzo, pro kio tiel multe da katolikemaj anglikanoj ankoraŭ restas en la skismo. Estis la ĉiama diro de granda Anglikano: „Spartam nactus es, hanc exorna!”

Oni povas respekti tian vidpunkton, dum samtempe oni senhezite kondamnas ĝin. Tiuj, kiuj obstine rifuzas sekvi la lumon de Dia vero en la unu Eklezion, eĉ pro bonŝajnaj kialoj, ne nur riskas la savon de siaj animoj, sed ili ankaŭ malhelpas multe da dubantoj kaj hezitatoj, kiuj per iom da kuraĝigo baldaŭ enirus la Ŝafejon de Kristo. Sed kiam tiuj ĉi vidas tiel multe da homoj, kiujn ili kutimas nomi „bonaj Katolikoj” (ĉar tiel ili ofte priskribas siajn katolikemajn, sed nekatolikajn pastrojn), kontentaj resti ekstere de la Petra barko; tiam ili konkludas, ke la submetiĝo al la Ĉefpastro ne estas absolute deviga, kaj ili nature pliamas resti en la kutima amikaro, ol pasigi la estontajn tagojn

inter novaj homoj, nekonataj vizaĝoj, kaj aliaj mensoj.

Estas la plej granda gloro de la monaĥoj de Caldey, ke ili fine respondis al la ĉiela alvoko, spite sia fortega amo kaj lojaleco al sia „Sparto.” Ili estis kiel multe aliaj rilate al nesciado de la vero, sed ili sekvis la vojon de Dio ĝis sia povo, ĝis la limo de sia scio. Ili deziregis servi Dion laŭ la Regularo de S. Benedikto, kaj responde Li kompatis ilin kaj sendis al ili la veran lumon de la Evangelio. Kaj ili obeis, kaj ne ili sole, sed la tuta katolika mondo profitas per ilia bonvolo. Ni jam povas vidi, ke ĉio, kio okazis al ili, okazis por nia plibono, por ke ni reposedu la sanktaĵojn de la antikvaj tempoj. Ĉar vere en la ĉefaltaro de Caldey estas sanktaj ŝtonoj alportitaj for de multaj malnovaj abatejoj kaj preĝejoj. Jen estas la Abatejo de Selby, jen Walsingham, jen Tintern, jen preskaŭ-apostola Glastonbury. Jen estas peco de malproksima Lindisfarne; jen estas ŝtono de malsanktigita Westminster; jen la kapelo de S. Aŭgustino de Kantuario. Vere la Abato de Caldey rabegis la Egiptojn, Al Katolika Monaĥejo tiuj trezoroj kredeble ne venus, sed al Caldey ili ĉiuj alvenis kaj en Katolika Caldey ili nun restas kaj restos. Gloro al Dio!

La historieton de la konvertiĝo de la Caldey-anoj mi esperas rakonti laŭ oportuno.¹⁾ Hodiaŭ ni lasos ilin, ankoraŭ Anglikanojn, en sia kara insulo, vigillantaj kaj preĝantaj apud la senlacaj ondoj de la okcidenta maro. Tie kun paco en siaj koroj ili estas en la protekto de la Dio de ĉielo, laŭdante Lin je trankvila pieco, inter la ventegoj teruraj de l' mondo. Sed fine la ombro de venonta ŝanĝo atingas la korojn de tiu ĉi kaj tiu el la bonuloj. „*Ecce nubicula parva quasi vestigium hominis ascendebat de mari!*” Kiel la servanto de Elias, ili ŝajnas vidi malgrandan nubeton suprenirantan el la maro, similan al piedsigno de homo, antaŭdirantan la neeviteblan pluvegön. Ĉu estis-piedsigno de la Homo, Kiu estas Dio, kies vojo estas en la maro, kaj irejoj en la vastaj akvoj?

A. H. NANKIVELL.

¹⁾ Ni esperas, tre baldaŭ! (*La Redakcio de E.K.*)

La Katolika Eklezio juĝata de Protestanto.

(El la Revue Apologétique.)

D-ro Foerster, eksprofesoro de pedagogio en la Universitato de Zürich, skribis antaŭ ne longe:

„Hodiaŭ, post historio preskaŭ dudekjarcenta, ni povas senpartie prijuĝi la potencan ellaboraĵon plenumitan de la Apostoloj de Kristo, laŭ la volo de sia Majstro.

En nia dudeka jarcento, tiu majesta konstruaĵo, la Katolika Eklezio, elradias en sia tuta unueco, en sia tuta beleco. Nenia tera potenco iam kapablis ŝanceli ĝin.

Kontraŭ la roko de la Eklezia Unueco, kion efikis la persekutado de la Romaj Cezaroj, la herezaj mezepokaj ideofluoj, kaj la dissolvantaj emoj de la Reformacio?

Hodiaŭ la glavo dormas, sed akra batalo furiozas kontraŭ la diaj institucioj, kontraŭ la papeco. El sia alta observejo, dum ĉiuj jaroj, la papa dinastio estis atestanto de interpopolaj militadoj. Generacioj naskiĝis, generacioj malaperis, kaj la Eklezio vidis ĉiujn siajn malamikojn deglitantajn en la tombon. Ĉirkaŭ la Eklezio, ĉio senkoloriĝis, ĉio mortis; sola ŝi konservis sian junecan forton kaj sian belecon. La popoloj de la tero rigardis al ŝi, kaj petis ŝian protektadon. Ŝi akceptis ilin. Ŝi donis al ili la bonfarojn de civilizacio. Ŝi instruis ilin ŝati la vivon.

Poste, kiam ili sentis sin fortaj, ili opiniis, ke ili ne bezonas ŝin plu.

Tiu konduto afliktis, sed ne senkuraĝigis ŝin, ĉar en ŝi sidas Dia forto. En malfacilaj horoj, Dio starigis, por direkti Sian Eklezion, virojn fortajn per ilia volo kaj karito.

Interligita kun la Eklezio per miloj da vejnoj, la papeco estas por ŝi la principo de unueco. La papeco estas la roko, sur kiu tiu Eklezio estas konstruita. La papeco estas Petro vivanta en siaj posteuloj. Hodiaŭ disvastiĝas pli kaj pli la konvinko, ke estas necese havi videblan aŭtoritaton pri rivelitaj veroj; kaj ju pli nia epoko klopodas por liberigi sin de aŭtoritato, des pli insistema fariĝas la invito submetiĝi al la plej alta aŭtoritato ekzistanta en ĉi tiu

mondo. Sen ia aŭtoritato-interpretisto de la tradiciaj dogmoj, la aŭtoritato de Kristo kaj de la Evangelio estas nur sensenca vorto.”

(El *Belga Katoliko*.)

Tradukita de „RAMO”.

La Eklezio en jaro 1912.

Kiu kuraĝus, de la sojlo de ĵus komencita jaro, direkti pli malpli ĝustan rerigardon pri la religiaj vivesprimoj de la Eklezio en la pasinta jaro? En la internan vivon de la Eklezio, kiel ĝi prisentiĝas en la okuloj de Dio, ni neniam enrigardos; maksimume ni povas rezumi la ĉefajn eksterajn fariĝojn, kiuj okazis en la pli antaŭa scenejo de la historio kaj ni povas limigitamezure kelkajn ĝeneralajn dedukojn eltiri el ili. Ĉu progresis la regno de Dio en la animoj 1912? Ĉu kreskis la nombro de la elektitoj sammezure kiel en la lastaj jaroj? Ĉu la gajnoj de la misia laborado superas la perdojn per malaniĝo, persekutado, indiferentismo? Ĉu la kredo almenaŭ kreskis en la eŭropa mondo? La respondon pri tiuj demandoj ni devas lasi al la okuloj ĉiovidantaj de Dio. Sed unu eksterordan konsoligan simptomon ni tamen povas nomi kun tuta certeco en tiu sfero: ĝi estas la grava kreskado de la eŭkaristiaj komunioj en la tuta mondo. Diferenta en sia amplekso, tie-ĉi kiel duobligado, tie kiel triigado, la grava fenomeno povas esti ĉie observata, almenaŭ ĝis ia grado. Kiu tamen povus respondi la demandon, kiel granda estos la pliiĝado de la supernatura vivo, kiu povos deveni el la pliiĝado de la sakramentricevado.

Se oni ĉirkaŭrigardas tamen nur la *eksteran* interrilaton de la religiaj okazintaĵoj de la pasinta jaro, ĝi montriĝas klare, kiel la katolika eklezio laboradas ĉie diligente, iutempe venkinte, ofte ankaŭ persekutita, sed tamen nelace, pri la entreprenita afero de la renovigo de la mondo. Ĝi koncentriĝas, ĝi puriĝas, ĝi disvolvadas siajn fortojn kaj disvolvados ilin pliiĝotamezure, ĝis kiam oni ŝpertos iam, kiel el ĉiuj tiuj streĉadoj, tiuj-ĉi bataladoj, tiu-ĉi heroa

apostolato fariĝos la harmonio de la popoloj sub la gvidado de Dio, ĝis kien la humana malforto entute permesas tion.

La agado de la papeco povis esti observata sur la plej diferentaj sferoj. La papo protektis la mizerajn Indianojn en la latina Ameriko kaj rekomendis ilin al la speciala prizorgado de la episkopato; li laŭtigis voĉon favore de la per la kaŭĉuk-komercistoj grave premigitaj enlandanoj; li vive interesiĝis pri la stato de la katolikaj elmigrantoj de la latina rito kaj kreis por ili specialan, kun la konsistorial-kongregacio kunigitan, oficejon. Al pliigado de la regno de Kristo en tero li starigis la apostolikan prefekturon Niigata en Japanujo. Fida gardisto de la kristana kredo kaj de la kristana kulturo, li decidis la disputaĵon pri la germana gild-movado per encikliko, kiu favore la lumigado kaj samtempe la konsciencesplorado kunigis la aplikadon de justa ekonomia libereco kun la postuloj de la kredo. Kun la sama, de ĉielo inspirita saĝeco reduktis Pius X la trian ordenon de Sankta Francisko al la pure religia sfero, per tio, ke li malpermesis al ĝi, okupiĝi kun ekonomiaj kaj socialaj demandoj. Ĉien laŭtigis lia vorto, kie devis esti ŝirmataj persekutitoj, esti ĉenataj al la bono, armataj kontraŭ danĝeroj, kie la erarvojoj de kie ajn teorioj devis esti malakceptataj, la kreduloj unuigataj. Lia patra boneco kunigis en Vatikano 400 francajn unue komunikantojn kaj sennombrajn delegitojn. Lia energio defendis la armenikan patriarkon Mgr. TERZIAN kontraŭ la postuloj de la skismatiko apogiĝantaj je imperia „irado”. Kaj ĵus Romo prepariĝas festi la 16-an sekularrevenon de la tago, en kiu la Milana edikto estis publikita, kaj elvokas la tutan katolikan mondon, memorigi per festoj tiun fakton, kiu komencis la epokon de la triumfo por la kruco en romana regno.

Belgujo vidis en lasta jaro en religia kampo du gravajn faktojn: la ĝeneralan „ribelon” de la konsciencoj favore la misiistoj de la Kongo ŝtato, atakitaj malame en la parlamento kaj la venkon de la eklezio akiritan per preĝo kaj laboro ĉe la elektoj de 2 julio.

En *Francujo* furiozadas la jakobina persekutado. Unu hekatombo de „enskribitaj” ekleziaj institutoj sekvas al la alia, la preĝejoj estas lasitaj al la ruino. Sed samtempe religia elvekiĝo montriĝas kaj esprimiĝas per la praktika organizado de la diocesaj unuiĝoj, per la retenado de la „Petites Soeurs d' Assomption” jam elpelitaj per kelkaj urbaj konsilanoj, per la pliiĝado de la antaŭurbaj paroĥoj, el kiuj en Paris sole 21 dum 10 jaroj estis kreitaj, per la pliiĝado de la nombro de la pastraj profesioj kaj per la floranta stato de la novaj seminarioj. „Ne”, diriĝ Pius X, „la pli malnova filino de la eklezio ne estas mortigonta!”

La germana imperio, en kiu la centro iome malpliigita per la elektoj de Januaro restis la decidanta frakcio de la imperia konsiliĝo, ĝojigis la eklezion per la brile funkciinta internacia Mariana kongreso en Trier kaj per la kunveno de la 59-a katolikatarĝo en Köln tiel fruktiga je grandaj kaj praktikaj instigoj. Bedaŭrinde la federacia konsilantaro, tute ne aniĝinta al la liberala komentario de la malamiga esceptleĝo kontraŭ la jesuitoj flanke de la bavara registaro, pliseverigis la liberecbatalantan tendencon.

Aŭstrujo montris al la mondo la grandegan, en la historio unikan spektaklon de la 23-a internacia Eŭkaristia kongreso, de kiu la kronadon je la 15-a de septembro, jartago de la liberado de Vieno, formis la majesta demonstracio, per kiu 250.000 kreduloj akklamis la sanktan eŭkaristion, kiam ĝi, akompanita de la imperiestro kaj lia tuta kortego, elmetita sur altaro en la pompkaleŝo de Maria Theresia kaj adorita genuo de la kardinallegato VAN ROSSUM, moviĝis tra la stratoj de la imperia urbo.

Hispanujo, sur kiu pezas la premsonĝo de la ferrerismo, vekigis el sia letargio: viva movado de la reakcio kontraŭ la terorismo ekskuis ĝin el somno, post kiam la atentato kontraŭ Canalejas, la viktimo de sia eraro kaj de siaj iluzioj, fine malfermis la okulojn al ĉiuj inteligentaj patriotoj. En tiu-ĉi nobla kaj tiel kredeme restinta lando okazis dum-jare ankaŭ en Pamplona, kun partopreno de la anoj de gvidantaj partioj, kongreso, kiu sin turnis kontraŭ la blasfemoj, postulante leĝajn punojn.

Ankaŭ la glora venko de la *Svisaj* katolikoj pri longjara maljusteco estas tie-ĉi menciinda: la katedralo Notre Dame, en Genevo estis reakirita aĉete for de la „Altkatolikoj”.

Fiere ni mencias ankaŭ kiel nerefuteblan pruvon por la reputacio de la roma eklezio en la *angelsaksa* kaj *amerika* mondo la brilantan oficialan akcepton de la nova kardinalo BOURNE en Westminster, la demonstracion de la 50.000 kreduloj ĉe la eniro de la kardinalo FARLEY en New York kaj la altigon de la ĉefepiskopo Mgr. NOUEL al la prezidanteco en la Dominikana respubliko.

Bedaŭrinde tamen la persekutado en kelkaj landoj ankoraŭ longe ne malarmiĝis, kvankam ĝi ne atingis grandan sukceson. Ĝi furiozis en *Brasilujo*, kie la prezidanto fermigis la monaĥejon franciskan San Antonio en Rio de Janeiro, sed kie la katolikoj defendis siajn rajton energie antaŭ la juĝistaroj; ĝi daŭris furiozi en *Portugalujo*, kie ses episkopoj estis elŝiritaj el iliaj diocesaj kaj forpelitaj, tamen la popolo montras pli evidente sian aniĝecon al la eklezio, 8000 personoj akompanis la patriarkon de Lisbon de la respublika registaro ekzilitan, la pastroj rifuzas la leĝon de la disiĝo kaj kelkaj de la 217 pastroj, kiuj estis akceptintaj la skismatikajn pensionojn, rezignis kaŭze de la protesto de la popolo.

Same ankaŭ *Ruslando* persekutas siajn katolikojn, speciale en la Zarlando Polujo. Ĝi kreis la delikton de la proselitismo kontraŭ la pastroj, kiuj intencis fruktodoniĝi la konitan Ukason pri la religia libereco al sia eklezio; ĝi trenis la ĉefepiskopon de Varsovia kaj aliajn episkopojn antaŭ la tribunaloj; ĝi kondamnis la sufraganon de Varsovia al 16 monatoj de mallibereco kaj al rezignado de lia episkopa indo, ĉar li konfirmis la edzecon de du antaŭaj Mariavitoj. Sed ĉiuj tiuj tormentigoj ne sukcesos, triumfi pri la brava Polujo, kiu ne, kiel la Berlinaj Hakatistoj (Polon-malamoj) kredigas, pripensas preni la armilojn, ankoraŭ multe malpli pri tio, delasi de sia centjara kontraŭstarado kontraŭ tiuj, kiuj intencas rabi for de ĝi ĝian kredon, ĝian lingvon, ĝian nacian konscion.

En *Luxemburgo* lernejeleĝo rabis al la eklezio ĝiajn raj-

tojn pri la edukado de la infanoj, sed la maljusteco trovis en Mgr. KOPPES episkopon de malofta braveco, kiu sukcesis forŝiri al la hipokriteco de la sektanoj la maskon kaj malpermesis al la pastraro la kunagadon pri la plenumado de la leĝo.

Ni ne povas fini tiun-ĉi revuon pri la fariĝoj de la jaro 1912-a, sen ke ni donas tributon de malĝojo al la noblaj defenduloj de la eklezio, kiujn la morto forprenis el la rondoj de la hierarkio aŭ de la kredulaj laikoj: al la kardinaloj FISCHER de Köln, COULLIÉ de Lyon, CAPECELATRO de Capua, SAMASSA de Erlaŭ, al la Patroj ZOCCHIE, redaktoro de la Civiltà kaj glorita predikanto, kaj V. BAILLY, fondinto de la Croix, fine al la diplomatoj W. VERSPEYEN ĉaj A. BEERNAERT en Belgujo, Dr. EBENHOCH en Aŭstrujo, F. ZICHY en Hungarujo k. t. p.

Kvankam tiu-ĉi mallonga vekigo de rememoroj nur malkompleta estas, ĝi provis tamen denove la nedetruieblan vivforton kaj la mirigan fekundecon de la eklezio, kaj la naŭa regadjara de Piuso X-a, kiu staras kun forta mano al la direktilo de la ŝipeto de Petruso, atendigas nin la estontecon konfide.

Laŭ la „Gazette de Liège”, 1-a de Januaro 1913.

Esperantigis P-ro MADLENER.

Esperanto kaj la Framasonaro.

Antaŭ ne longe aperis en belga katolika Revuo, kies celo estas defendi la katolikan religion kontraŭ la Framasonaro, kritiko kontraŭ Esperanto. Mi ne nur abonas tiun bonegan Revuon de post ĝia stariĝo, sed mi ankaŭ laboris por varbi al ĝi multajn subtenantojn. Mi, do, bedaŭris legi en tiu revuo raporton pri iu franca gazeto, kiu, sen iu ajn serioza ekzameno de la demando, akuzis Esperanton esti nur batalilo de la framasono, en ĝia milito kontraŭ la katolika religio.

Mi tuj skribis al la lerta kaj agema redaktoro, kiu estas unu el miaj plej estimataj amikoj. Bedaŭrinde li sciigis al mi, ke mia letero ne provos aperi antaŭ la Maja No de lia revuo. Nu, ĉar multaj katolikaj esperantistoj skribis al mi pri tiu stranga kritiko, mi opinias, ke estas necese doni pri ĝi kelkajn klarigojn en tiu ĉi Revuo.

La vera stato de la afero estas tiel klara, tiel evidenta, ke ĉiu esperantista ĝin komprenos sen iu klarigo. Efektive Esperanto estas lingvo, nur lingvo. Ĝi estas lingvo tiel facila, tiel simpla, kaj samtempe tiel klara kaj logika, ke iu ajn homo je normala intelekto povas ĝin lerni, kaj uzadi post unu aŭ du monotoj de studado. Do, kompreneble, ĉiu societo aŭ aro da homoj, kie celas internaciajn rilatojn, ĉu tiu celo estas bona aŭ malbona, volonte kaj nature, servigas al si Esperanton. Ne estas do dubo, ke la Framasonaro, perfida sekto, kiu havas anojn en ĉiu lando, uzas kaj uzos pli kaj pli, Esperanton, sammaniere ke ĝi uzas la presaron, la literaturon, kaj aliajn rimedojn neŭtralajn, serveblajn indiferente, por la bono aŭ por la malbono.

Sed, kio estas la konkludo evidenta al ĉiu, kiu posedas eĉ la plej ordinaran inteligentecon? Jen tiu konkludo: ĉar Esperanto povas potence helpi la malamikojn de nia S-ta Religio, estus ne nur stulteco, sed eĉ krimo forlasi tian batalilon eksklusive inter ilioj manoj. Male, estas nia devo uzi Esperanton, tiel kiel ni jam de longe uzas la presaron, la arton, la literaturon k. t. p. por defendi la Eklezion de Kristo kontraŭ la atakoj de ĝiaj malamikoj. Sed, plue, ĉar precise „in casu” ni devas malkovri la malpiajn sekretojn de la Framasonaro, necese estas, ke ni bone lernu la internacian ligvon, per kiu tiu sekreta societo korespondas kun siaj anoj, ne nur en Eŭropo sed ankaŭ en Azio kaj Afriko.

Cetere la *intelligentaj* katolikoj (domaĝe, ne ĉiu katoliko meritas tiun kvalitecon) praktike agas laŭ tiu konkludo de post multaj jaroj. La pia kaj klera Abato Peltier fondis sian internacian revuon „Espero Katolika”, ne nur por interrilati kun ĉiulandaj katolikoj, sed ankaŭ por defendi la S-tan Eklezion kontraŭ ĝiaj diverslandaj malamikoj.

Plue, en niaj du unuaj katolikaj kongresoj, en Paris 1910 kaj en La Hago 1911, ni pritraktis la demandon: „Kiel, per Esperanto, defendi nian sanktan religion kontraŭ la atakoj de la sekretaj socitoj”. Fine, dum nia Tria Kongreso en Budapest 1912, sub la prezidanteco de tiu agema Prelato Mgr. GIESSWEIN, ni proponis la fondon de speciala „Anti-framasona Ligo” internacia kaj tutmonda; la Kongreso faris al mi, membro de la „Ligue Antimaconique Belge”, la honoron delegi min por alporti al niaj belgaj amikoj la salutojn kaj bondezirojn de la kongreso, kaj por camtempe esprimi ĝian deziron: „kunlabori kun ĝi al la defendo de la tutmonda, malpia Framasona sekto”.

Nu, la Revuo, kiu enhavas tiun tute eraran kritikon de Esperanto estas precise la oficiala Organo de la „Belga Antiframasona Ligo”. Do ni povas fidi al la bona kaj tuteestiminda Redaktoro, por ke li donu en la Maja No de sia Bulteno la saman publikecon al nia klarigo, kiel li donis al nia franca kritikulo.

A. RICHARDSON.

Kroniko de I. K. U. E.

Katolika Esperanta Agado en Katalun-lando (Hispanujo).

Dank' al senĉesa laborado de la Katolikaj Esperantistoj kaj precipe de la pastroj-anoj, nia potenca mondlingvilo tre kreskas kaj disvastiĝas en nia Katalun-lando pro bono kaj gloro de Sankta Religio. Kiel suno eknaskiĝanta ĉe la Oriento, iom post iom, forigas densajn mallumojn de la nokto, kaj aperiĝanta sur la horizonto, ĉion lumigas, ĉion briligas per siaj ĉarmaj lum-radioj; tiel ankaŭ estas forpusataj, iomete post iomete el sento de niaj katolikaj samlandanoj, mallogoj, kiujn ĝis nune multaj el ili sentis pro nia mondmovado. Hieraŭ estis en Barbará del Vallés, en kies paroĥo kunvenis la anaroj de la „Kataluna Ligo de Katolikaj Esperantistoj” por solenigi al sia patronino la

Virgulino de la Espero. Hodiaŭ estis Olot, bela, gastema kaj religia Urbo el Ĝeron-provinco elektita de la sama Ligo, kien oni kuniĝis okaze de la II-a.

Pasintan fest-tagon de Pentekosto okazis en Olot la IV-a kongreso de „Kataluna Esperantista Federacio”, kaj la II-a de K.L. de K.E. La plej granda sukcesego kronis la laboradon de ĝiaj organizintoj. Je la dekdua matene alvenis en la Olota stacidomo la vagonaro plenigita je gesamideanoj el Barcelono, Ĝerono kaj ankaŭ el aliaj Hispan-regionoj. Tri aŭ kvar mil geolotanoj kun la Urb-estraro, Juĝisto kaj aliaj aŭtoritatoj, freneze promenadis tra la belegaj promenejoj, kiuj ĉirkaŭas la stacidomon, atendantaj la alvenon de la kongresistoj. Apenaŭ la vagonaro aperis, kiam longaj kaj bruegaj aplaŭdadoj, kies eĥoj resonis ĉe la proksimaj estingitaj vulkanaj montetoj, tondris la spacon, dum la Urb-muzikistaro ludis internacian himnon.

Inter la kunalvenintoj ĉeestis D-ro A. RIERA, prezidanto de la Ĝerona Deputacio kaj riprezentanto de la Ministro de Instruado kaj Belaj Artoj, Kapitanoj Guttierrez kaj Perogordo, riprezentanto de la ministro por militaj aferoj kaj delegito el Madridgrupanoj. Pastroj D-ro J. Coll, profesoro de esperanto en la Barcelona Universitato kaj D-ro J. Casanovas, Katedraliko el Ĝeron-Seminario k. c. ĝis pli ol tricent samideanoj. Post salutadoj kaj manpremoj oni sin direktis al Urbdomo akompanata de la muzik-akordoj kaj naŭ verd-standardoj ventumis kaj serpentumis movitaj per malvarmeta aero dum la triumf-marŝado tra la ĉefvojo sub la foliokovritaj arbaroj. En la urbdomo la urbestro ricevis kaj salutis, je la nomo de la Olotanoj, la kongresistojn dirante, ke la plej feliĉa sukcesego kronu ilian laboradon.

Je la tria posttagmeze la K. E. F. malfermis la unuan kongreskunsidon en la akt-salono de la Urbdomo. Prezidis D-ro Rieva, delegito de la Instruad-Ministro, kiu en lia nomo malfermis la kongreson.

Je la naŭa vespere okazis en la „Olota Teatro” la Floraj Ludoj, bela kaj poetika amfesto, organizita de la „Olota Stelo”, la amaso komplete plenigis ĉiujn sidilojn en la granda teatro. Estis elektita fest-Reĝino F-ino Maria Escubos, kiu

akompanata de ĉarmaj F-noj, sediĝis sur la prezida seĝo. Ĉi tiu amfesto vere amuzis la ĉeestantaron.

La dua kongrestago estis dediĉita preskaŭ tuta al katolikaj esperantistaroj. Matene, je la oka okazis en la bela preĝejo de Nia Sinjorino de la Tura, patronino de la Olotanoj, la Sankta Meso, kiun diris la Rda Pastro J. Planas, paroĥestro el Barbará. La preĝejo malgraŭ ĝia grandeco estis preskaŭ tro malgranda por enhavi la katolikan ĉeestantaron. En la presbiterejo, honore sidiĝis uniforme vestitaj Kapitanoj Perogordo kaj Sutierrez, Pastro D-ro Coll, kaj la juna germano Kurt Fritzching.

Kiam ekkomencis la Sankta Meso, supreniris la predikojn Pastro Francisko Viver el San Felio de Suixols, kiu komencis sian belan predikon, esprimante sian plezuregon por povi unuafoje utiligi la belsonan internacian lingvon Esperanto por kanti kaj laŭdegi la grandaĵojn de katolika Religio, kaj eĉ, sub la aŭspicioj de la Reĝino de la Espero, patronino de la katolikaj anaroj, antaŭ ŝia bona imago de la Tura, stelo de Espero por la veraj Olotanoj. Li montris elokvente la sendiskutan influon, kiun en la kampo de Katolika Eklezio ekzercos Esperanto, kies ideo de amopaco kaj frateco estas la sama, kiun venis dissemi sur la tuteron Nia Di-Savinto. Li rimarkis, ke la Katolikaro devas kunklopodi por la propagando de niaj karaj idealoj, se ne ni lasus al malamikoj potencon batalad-armilon, kiu donus al ili egan superecon super ni; pro la nekalkuleblaj utiloj kiujn ĝi alportos al ĉiuj, kiuj ĝin adoptos en la internaciaj rilatoj. Li resumis katalune la precipajn paragrafojn el sia interesa prediko, por ke ĉiuj, kiuj ne konas tiun simplan kaj harmonian lingvon, kiel eble plej baldaŭe decidu ĝin enstudi.

Post la Meso, la anaroj de la K. L. de K. E. kunvenis en la Katolika Sidejo, kies salonego preskaŭ pleniĝis je fervoraj kaj katolikaj anaroj.

Pastro D-ro COLL rapordis la laboradon faritan de la Ligo dum la pasinta jaro, oni aprobis kelkajn sendiskutajn proponojn kaj plezurege sciigis al kongreso, ke „Kataluna Katoliko”, organo de katolika Ligo, aperos regule dank al malavareco de iuj fervoraj esperantistoj. Ankaŭ la kon-

greso nomis delegitojn por iniciati la aliĝon de novaj grupanoj al K. L. Fine oni elektis la jenan nov-komitaton S-ro J. ROSALS, presidanto, D-ro J. CASANOVAS, viĉ-presidanto, R-da J. SABATÉ, sekretario, M. GILI, kasisto, J. MAURY kaj Pastro VIVER, voĉdonantoj. Post dankado de la ĵus-elektita komitato, la kongresanoj sin levis por ĉeesti al la dua kunsido de K. E. F.

Tagmeze okazis malavara tagmanĝ-festeno en la „Olota Kunvenejo”, en kiu ĉeestis 150 kunmanĝantoj. Iniciatis la toastojn S-ro ROURA, kiu je la nomo de Olot prononcis entusiasman paroladon. La indega Deputato Petro LLOSSAS, per sia elokventeco forkaptis la ĉeestantaron, kiu multfoje per siaj bruegaj aplaŭdadoj interrompis la belajn paragrafojn el lia interesege kaj religia parolado. „Mi reprezentas — li diris — ĉi tiean distrikton, kaj je ĝia nomo mi plezuregas rigardi, kiel vi dissemas ĉi tie vian semon: la amafero, kunigi homaron per sama lingvo Esperanto. Grandega kaj enviinda idealo do, homaro havas nur unu koron, ankaŭ estos havante nur unu aspiron, kiel ĝi havas unu finon. Kiam vi, el la piedoj de la Virgulino de la Tura, reiros al viaj hejmoj, mi ne dubas, ke varmigite via entuziasmo per l' amo, kiun ŝi komunikos al vi, via entrepreno vere sukcesegu”. Ĉi tiuj vortoj elŝiris el la ĉeestantaro bruegan ovacion. Ankaŭ toastis la indaj kaptanoj PEROGARDO kaj GUTIERREZ, Pastro D-ro COLL, S-ro Kurt FRITZCHING, D-ro BREMON, kaj S-roj PUJULA kaj GRAN, kies paroladoj rikoltis entuziasmajn aplaŭdadojn. Post kanto de „La Espero” la amaso sin direktis al Urbdomo por ĉeesti al la fermo de la kongreso.

La kongresistoj akompanataj de Olotaj anoj faris kelkajn ekskursojn tra la petindraj Olotaj ĉirkaŭaĵoj, visitis la freŝajn fontojn el Sankta Roko, en kies ĉarma promenejo oni dancis *Sardanojn* (Kataluna danco), ankaŭ vizitis la principajn Urb-konstruaĵojn. Kiam ili entuziasmplenaj foriris el Olot, el siaj buŝoj nur eliris la jenaj vortoj: ĝis la venonta en San Felio de Guixols!...

Pastro Paŭlo PLANA, paroĥestro
El Ventallo.

MIKSAĴOJ.

„*Paris-Esperanto*” (Junio 1913) enhavas francan artikolon, verkitan de S-ro Carlo BOURLET kaj titolitan: „*De Paris à Rome par Gand, Stuttgart, Berne et Milan*”. La Esperantistoj, li skribas, ne memoras someron, kiu donis tian vicon da festoj kaj kongresoj. De 14 Aŭgusto ĝis 15 Septembro tiuj el niaj samideanoj, kiuj inklinas al vojaĝado, povas iri de urbo al urbo kaj ĉeesti ne interrompitan vicon da Esperantitaj manifestadoj. Unue niaj Belgaj amikoj organizas Esperanto-semajnon 15-20 Aŭg. en Gento, sub oficiala protekto de la Registaro kaj de la Grupo XXII de la ekspozicio universala. Forvojaĝante al Berno, ni haltas dum vojaĝo en Stuttgart, kie okazos la Kongreso Esperantista Germanlando 19-21 Aŭg. La 22-an ni foriros kaj povos ĉeesti la malferman kunsidon de La Naŭa en Berno la 24-an de Aŭg. je la tria posttagmeze. Ĉio antaŭvidigas, ke La Naŭa neniurilate estos malsupera al la antaŭaj kongresoj tiel per la nombro de kongresistoj, kiel per la bona organizo. Por la unua fojo nia granda Asocio U. E. A. prenis sur sin mem tiun-ĉi malfacilan taskon. Dank’ al la publikeco de ĝia ĵurnalo, oficiala organo de la loka komitato, dank’ al ĝiaj delegitoj, al la efikeco de ĝia reklamo. al la perfekta reguleco de ĝiaj servoj, ni havos tie sendube modelan kongreson. Plue Berno kuŝas en la centro de Eŭropo kaj la gastemeco de la Svisoj estas ĉie konita. — Forlasante Bernon, ni iras ankoraŭ pli suden por ĉeesti la nacian Italian kongreson Esperantistan en Milano 31 Aŭg. ĝis 2 Sept. Tie estos la unua haltejo por kunigi la pilgrimon de la Katolikaj Esperantistoj, kiuj iros Romon por sia kvara internacia kongreso de Katolikoj Esperantistaj. 4—10 Septembro.

„Tiel, post travojaĝado, laŭ linio rekte malsupreniranta, de Belgujo, Germanujo, Svisujo kaj Italujo, kaj estinte ĉiam en rilatoj kun Esperantistoj, ni finigos tiun grandan vojaĝon en la famega Urbo sankta, kie Esperanto trovos,

en la religia mondo, definitivan konsakron dum la aŭdienco, kiun la Sankta Patro bonvolos havigi al la Esperantistaj pilgrimantoj”.

* * *

La supra mallonga resumo de la artikolo de S-ro BOURLET, en kiu li tiel bonvole priparolas nian pilgrimadon, certe samtempe ankaŭ estas intencita kiel refuto de la denove disrakontita legendo, ke Esperanto estas nur ilo de la framasonoj. Tiu malnova aserto jam pli ol unu fojon estis refutita en E. K. En epoko, en kiu Esperanto tre malmulte estis disvastigita en katolikaj rondoj, tiu aserto estis simple signo de nescio aŭ antaŭjuĝo de samkredanoj. Sed nuntempe la obstina disvastigo de tiu sensencaĵo certe havas alian kaŭzon. Ŝajnas al mi, ke ne nescio kaj antaŭjuĝo, sed malico kaj mensogo estas la nuntempaj gepatroj, kaj la afero memorigas al mi la senĉesan ripetadon de alia malnova aserto en Nederlandaj Katolikaj ĵurnaloj en 1912 kaj 1913. La granda katolika ĵurnalo „*De Tijd*“ i. a. ridendigis sin l’ antaŭan jaron per serioza enpresigo de malsaĝa artikolo, en kiu Esperanto kaj Esperantismo estis priskribita kiel speco de tuthoma religio kun dogmoj, koncilioj, indekso, papo k.t.p.!! Kompreneble la verkisto de tiu artikolo estis Idisto. Kaj la celo estis: per katolika gazeto forturni la Katolikajn legantojn for de Esperanto. *Tamen Esperanto estis, estas, estos kaj povas esti nur rimedo, kiel ĉiu ajn lingvo, t.e. per ĝi ni intencas buŝe aŭ skribe komuniki niajn pensojn al aliaj homoj; kaj la Esperanto-movado estas nur la propagando de tiu-ĉi internacia helplingvo, por ke ĝi fine ĉie estu akceptita kaj praktikita.* La afero estas tiel simpla, ke estas preskaŭ peko, malŝpari nian tempon por eldiri tian evidentan veron por ĉiu sana prudento. — Mi scias, ke tamen estonte la Idistoj denove trompos la publikon, ĉar ili daŭrigos klopodi, per malhonestaj rimedoj kontraŭbatali Esperanton, pro tio ke ili sentas, ke ne plu estas ebla. eĉ per honestaj rimedoj, sukcesigi ilian Esperanto-plagiaton. La rolo de la anoj de la malvivnaskita Ido-lingvo do estas nur: kontraŭbatali kaj kalumnii la forte vivantan kaj plensanan Esper-

anton. Aŭ ili tiel daŭrigos — aŭ malkuraĝigitaj ili lasos Idon entombigitan kaj Esperanton triumfontan.

En alia Nederl. Katol. ĵurnalo (*De Residentiebode*) okazis en Aprilo 1913 polemiko inter la idista pastro MENS kaj la Esperantisto POTHAST. Kompreneble la Idisto, pristudinte la idistan ĵargonon, donis tie pruvon pri sia „kapa-bleco” kaj i.a. proponis Esperanton k.t.p. kiel la ĝeneralan mondreligion kun Esperanto-papo k.t.p. Do ni estas jam kutimigitaj al tiuj trompigaj malveraj asertoj de Idistoj en naciaj katolikaj ĵurnaloj. Tiuokaze tamen mi ankaŭ ensendis artikolon, ĉar tiu Idisto atakis min persone. I.a. li skribis, ke mi ne scias Idon! Vere mortpeko . . . ! Sed serioze: kompreneble ĉiu Esperantisto, legante kun iom da atento, komprenas Idan tekston, ĉar Ido estas nur Esperanto-plagiato. Sed jen la historio, kiun tiu Idisto aludis: en 1912 S-ro COUTURAT klopodis malfermi polemikon en *Espero Katolika* kaj skribis al mi leteron en Ido. Mi moke respondis, ke mi ne komprenas la leteron; se li skribos en iu de mi konata lingvo, eble mi respondos. Kaj aŭskultu: li efektive reskribis al mi la saman leteron en *pura* Esperanto! Mi tamen ne havis tempon por malŝpari pro senfrukta polemiko kun Idistoj. Pro tio mi silentis. Sed en „*Progreso*” koleriĝe S-ro CONTURAT skribis precipe pri mia „peko”: mia „nescio” de Ido. Li ŝajnas opinii, kiam Nederlanda Idisto skribas en Nederlanda ĵurnalo nederlandlingve, ke tiam Nederlanda Esperantisto ne povas kompreni *la malveraĵojn pri Esperanto*, kiujn li legas en la Idistaj artikoloj, sen antaŭa abono kaj konstanta trastudado de ĉiuj Idalingvaj presaĵoj!! Naive, ĉu ne? — Por daŭrigi: la suprenomita Idisto skribis ne nur, ke mi ne scias Idon, sed ankaŭ, ke mi ne scias Esperanton kaj scias nenion pri la Esperanto-movado. La afero fariĝis do pli kaj pli interesa, precipe por mi mem. Mi nur rimarkos, ke mi estas Esperantisto de post 8 jaroj; ke mi estis la prezidanto de la stariga komitato de la Nederlanda Katolika Ligo Esperantista, kiu estis starigita 29 Aŭgusto 1909 kaj kiu estas nuntempe la plej granda Esperanto-societo en tuta Nederlando; ke mi eldonis 1 Januaro 1910 la Esp.-

gazeton „Nederlanda Katoliko”, kaj do ricevis ĉiuspecajn interŝanĝnumerojn, per kiuj mi ricevis detalajn informojn pri la Esperanto-movado en ĉiuj landoj; ke mi eldonis en 1910 nederlandlingvan broŝuron „*Aan Esperanto de toekomst!*” (Al Esperanto la estonto!), granda proksimume 180 paĝojn de tiu ĉi revuo E. K., kaj ke tiu broŝuro enhavas plej detalajn informojn pri Esperanto, la Esperanto-movado kaj la Ido-movado ĝis 1910, kaj ke ĝi estas ankoraŭ nuntempe la sola kaj kompleta nederlandlingva Esperanto-broŝuro; ke oni elektis min dum Nia Dua en Hago 1911 redaktoro de E. K., k. t. p. tamen la Idistoj publike skribas, ke mi scias nenion pri Esperanto kaj la Esperanto-movado Sed por esti justa, mi tuj aldonu, ke tiu malveraĵo ne estas pure Idista produkto. Efektive la Idisto aldonas citaton el Esperanto-gazeto. Mi mem ankaŭ legis, post apero de mia artikolo „La Organiza Demando” en E. K. Junio 1912, tiun citaton en *Lingvo Internacia*, sed mi simple silentis. Kaj mi estus silentinta pri ĝi, se nur ne la Idistoj — kiuj laŭkutime ĉerpas malveraĵojn el la Esperanto-gazetaro por ataki Esperantistojn kaj Esperanto-aferojn — ĝin estus maluzintaj por ataki min, kiun ili konas kiel sian konvekitan kontraŭulon. Mi ne mencias tiun historion por esti malagrabla al *Lingvo Internacia*, ĉar mi scias, ke ĝi skribis pri mi tiun frazon en malfacila situacio: mi vidas en tiu frazo nur „poezian liberecon” en la varmego de la polemiko; plue post La Oka en Krakovo ni sekvas la konsilon de nia Majstro pri „konkordo”: Esperantistoj ne plu interbatalas. Sed mi skribas pri supra afero nur, por ke mi povu citi suprediritajn, kiam Idistoj daŭrigos proponi min kiel plennesciulon pri Esperanto kaj Esperanto-aferoj.

* *
*

Mi skribis supre, ke la legendo pri Esperanto kiel framasonaĵo verŝajne havas kiel gepatrojn nur malicon kaj mensogon. Kaj la obstine daŭrigata, kvankam ofte refufita, aserto ke Esperanto celas starigi ĝeneralan mondreligion kun dogmoj, koncilioj, papo k.t.p., supozigas min, ke ankaŭ la Idistoj eble ne estas fremdaj je tiu lastatempe obstine disvastigita

framasonaj-legendo. Kiu scias? Eble la diablo, la princo de la mensogo, uzas ilin kiel siajn helpantojn, ĉar li verŝajne ankaŭ legis en nia E. K., ke Papo PIO X diris: „Esperanto havas grandan estontecon antaŭ si,” kaj Kardinalo VAN ROSSUM: „Esperanto faros grandajn servojn al la Eklezio.” Kaj li certe nuntempe tremas kiel kano, leginte, ke la Esperantistoj Katolikaj organizas internacian pilgrimon al Romo, k.t.p. Efektive Esperanto ne povas ne esti ĉiurilate plej efika rimedo por la universala popolo Katolika. La diablo komprenas tion kiel veraĵon. Pro tio, konante precise la adresojn de siaj helpantoj en la disvastigo de la regno de mensogo, li verŝajne elektis siajn plej fidelajn servojn por, se eble, malsukcesigi Esperanton en katolikaj rondoj

*
*
*

Kio ajn pri tio estas, mi ankoraŭ rakontos, kiel la sama Idisto, en *De Residentiebode* 14 Aprilo 1913, ludis la rolon de „enfant terrible”. Li citas D-ron W. OSTWALD, kiu skribis „en la principaj Eŭropaj gazetoj” i.a. „ke li disponas pri mono por helpi la disvastiĝon de la lingvo internacia, sed ke li fordonos eĉ ne unu *Pfennig* por la malnova Esperanto kaj ĝiaj anoj, i.a. pro tio, ke tiuj-ĉi ne havas sufiĉe da *scienca* spirito, kaj ĉar li persone renkontis ankoraŭ lasttempe tiel malmulte da ĵurnalista honesteco ĉe riprezentanto de la gazetaro Esperantista.” — Jen vere gravega kialo! Do ne la esenca valoro de lingvo internacia decidis, sed . . . persona kaprico! La afero mem estas flankajo; la persono de OSTWALD, ne sufiĉe respektita kaj adorita estas la ĉefaĵo.

Sed la manko de *scienca* spirito . . . ?

Mi pro tio finas per citaĵo el *Germana Esperantisto* Junio 1913, Eldono A, p. 92:

Malgranda eraro?

Esperantistoj atentu!

En *Wochenausgabe des Berliner Tageblattes* de la 29-a de Majo, Profesoro Wilhelm Ostwald aperigis artikolon „Weltsprache?” en formo de dialogo inter komercisto kaj scienculo. Entute la ar-

tikolo estas objektiva; nur unu punkto estas rimarkinda por ni: Parolante pri la jam ekzistantaj lingvoj tnternaciaj la „scienculo” tute flanke preteriras Esperanton kaj rekomendas Idon, pri kiu li diras:

„La plej altan punkton en tiu-ĉi evolua vico nuntempe atingis la mondlingvo Ido, kiu estas plibonigita kaj simpligita Esperanto, de tiu lingvo, kiu post la malapero de Volapük *estis akirinta* la plej grandan disvastiĝon.”

En la originala teksto la kursive presitaj vortoj estas jenaj: *gewonnen hatte*. Laŭ tio la legantoj devas supozi, ke ankaŭ Esperanto estas malaperanta, kaj ke Ido nun estas la plej disvastiĝinta lingvo internacia. Kelkaj konatoj, al kiuj mi montris la cititan tekston, almenaŭ komprenis ĝin tiel.

Ĉi tiun malĝustan konjekton ni devas forigi de la leganioj de l' dirita gazeto, kiu precipe iras eksterlanden. Pro tio mi petas la samideanojn, *ankaŭ la negermanajn*, ke kiel eble plej multaj el ili skribu al la redakcio de la gazeto kaj klarigu al ĝi la veran staton de la mondlingva movado kaj la neverecon de la diro, ke Ido estas *plibonigita kaj simpligita* Esperanto. Tio estas tiom pli facila, ke la redakcio en piednoto eĉ instigas la abonantojn (aŭ legantojn) al esprimado de ilia opinio pri la traktita problemo. Krom tio klarigo estas nepre necese, ĉar Prof. Ostwald volas daŭrigi la pritrakton de la sama temo. Sed mi insiste petas, ke oni skribu laŭfakte kaj objektive; ankaŭ sen trograndigo oni povas montri nian aferon sufiĉe forta.

Se negermano volas skribi en Esperanto, kio estas tre rekomendinda, li aldonu ĉe la kapo de sia letero la jenan germanlingvan rimarkon: *Diesen in Esperanto geschrieben Brief übersetzt kostenlos Redakteur F. Ellersiek, Berlin S. 59, Wissmannstrasse 46. Eko.*

Ni nun vidu, kia estas la „sciencia spirito”, kiun la scienculo Prof. OSTWALD praktikas, kaj kiun la Esperantistoj ne posedas. Ni lasos al niaj legantoj la konkludon, ĉu la Esperantistoj estas kompatindaj, ĉu gratulindaj pro la manko de la „sciencia spirito” laŭ la kompreno de Prof. OSTWALD (Nobelpremio 1909). ¹⁾

¹⁾ La Idistoj ne povas skribi la nomon de Prof. OSTWALD sen aldono de „Nobelpremio 1909”, kiun tiu granda ĥemiisto ricevis pro siaj gravaj ĥemiaj eltrovoj. Kiom ili ridindigas sin mem kaj

En mia nederlandlingva broŝuro mi citas la leteron, kiun skribis S-ro L. E. MEIER 12 Julio 1910 al la Germana Esperanto-Asocio. Li, Esperantisto de la komenco de nia movado, fariĝis Idisto en 1908. Li spertis, ke belaj promeso kaj grandaj vortoj ne sufiĉas por valorigi iun senvaloran aferon. Kaj li denove fariĝis konvinkita Esperantisto post dujaraj spertoj kaj kun „firma konvinkiĝo”, unue ke la ŝanĝema lingvo Ido neniam fariĝos preta, fiksita kaj praktika lingvo; due ke la intenco de la Ido-estroj estas starigi idiomon por kulturitaj kaj sciencaj homoj, kvankam mondlingvo devas esti uzebla por ĉiu ajn homo, eĉ neklera kaj ordinara; trie ke nur tiu lingvo fine venkos, kiu havas la plej grandan nombron da anoj kaj tiurilate Ido neniam povos superi Esperanton.

Jen kvieta konkludo de kompetentulo, konkludo, bazita nur sur faktoj kaj spertoj. Kaj post atenta legado de tiu konkludo de S-ro MEIER, la „plibonigo” kaj simpligo” de Esperanto per Ido sin montras al ni kiel nuraj vortoj kaj fantaziaĵo. Ĉar la ĉefa eco de *mondlingvo* estas, ke ĝi estas uzebla de la tuta *mondo*, do de ĉiu ajn homo; kaj „mondlingvo”, al kiu mankas tiu ĉefa eco, neeble povas esti plibonigo kompare al efektiva mondlingvo, kiu estas laŭintence kaj laŭsperte uzebla de ĉiu ajn kaj por ĉio ajn. Kaj ĉu ne estas sensencaĵo paroli pri „simpligita” mondlingvo kaj samtempe intence tiel kompliki ĝin, ke nur instruita kaj scienca homo scipovas ĝin praktike uzi? Laŭ la „scienca spirito” de Prof. Ostwald do „simpligo” signifus la samon kiel malfaciligado komplikigo; kaj „plibonigo” la samon kiel: forpreni de iu afero ĝian ĉefan kaj karakterizantan econ! — Tiu „simpligo” kaj „plibonigo” do estas nur vortoj, vortoj, vortoj; nur fantazio de la trompantaj kaj iluzio de la trompataj Idistoj. Kaj kiu *detale* deziras

Prof. OSTWALD estas facile kompreneble per jenaj ekzemploj: Prof. OSTWALD (Nobelpremio 1909) ne donos eĉ unu *Pfennig* por Esperanto; tio estas same ridinde kiel: Prof. OSTWALD (Nobelpr. 1909) surmetas sian ĉapelon, kiam li estas promenonta; aŭ: Prof. OSTWALD (Nobelpr. 1909) elpoŝigas sian ~~naŝ~~ ^{naŝ}tukon, kiam li ternas, k. t. p.

informiĝi pri la neekzisto de plibonigo kaj simpligo de Ido rilate al Esperanto, tiu legu la *efektive science* verkitan broŝuron de Prof. AYMONIER. titolitan: „Pri Esperanto.”¹⁾

Ankaŭ laŭ la „scienca spirito” de Prof. Ostwald Esperanto *estis akirinta* iam la plej granda disvastiĝon inter la lingvoj internaciaj. Sed ne nur precize *post* la apero de Ido Esperanto akiris sian plej grandan disvastiĝon, sed ĝia disvastiĝo konstante fariĝas pli granda, tiel ke Prof. BOURLET en sia artikolo „*De Paris à Rome par Gand, Stuttgart, Berne et Milan*” prave skribas: „La Esperantistoj ne memoras someron, kiu donis tian vicon da festoj kaj kongresoj. De 14 Aŭgusto ĝis 15 Septembro 1913 la samideanoj povos vojaĝi de urbo al urbo kaj ĉeesti ne interrompitan vicon da Esperantistaj manifestadoj.” — Precize Ido donis al Esperanto ĝian definitivan konfirmon. La *organizita* reformmanio (eĉ kun la helpo de Prof. Ostwald kaj de la mono, kiun li ricevis por helpi la disvastiĝon de la lingvo internacia kaj de kiu li eldonis eĉ ne unu *Pfennig* por Esperanto) ne pli efikis ol la *individuaj* reformklopodoj dum la 20 unuaj jaroj de la ekzisto de Esperanto. Male, precize Ido montris, ke Esperanto estas la sola kaj plej perfekta formo de lingvo internacia por la praktika uzo tiel skribe kiel buŝe. Pro tio la plej granda disvastiĝo de Esperanto estas ankaŭ garantiita por la estonto. Kaj, kiel prave rimarkas S-ro Meier, Ido, kiu intence estas destinita nur por aparta klaso de personoj (instruitoj), neniam povos superi nombre Esperanton. Kiel antaŭe tiel ankaŭ nun kaj poste Esperantego povas enpoŝigi Ideton, kiel giganto enpoŝigas naŝtuketon.

D-ro SMULDERS.

P.S. Dum la korektado de la presprovoj de supra artikolo, mi ricevis la Majo-Junio-numeron de „*Lingvo Kosmopolita*, monata gazeto por la diskutado de lingvaj temoj kaj kontrolado de la lingva evoluo de Esperanto konforme al la postuloj de la tekniko kaj komerco;” redaktoro Prof. R. de SAUSSURE, konata scienculo, kiu de la komenco okupis sin pri la Ida lingvo kaj kiu per gravaj

¹⁾ Vidu noton al la fino de tiu ĉi artikolo.

lingvaj studoj tiom da klareco alportis al multaj komplikitaj lingvaj demandoj. Li (feliĉe!) finis sian teorian studon pri nova formo de lingvo internacia bazita sur Esperanto kaj Ido: studon, kiu eliras el la falsa vidpunkto, ke Ido estus preta lingvo kaj egale konsiderinda kiel Esperanto. Kvankam ni devis admiri la sagacecon de Prof. DE SAUSSURE, tiu studo estas al ni la malpli simpatia, ĉar ĝi estas bazita sur falsaj supozoj. Nun li komencos pritrakti aliajn temojn kaj respondas al demando: „Ĉu oni devas reformi Esperanton?” Li dividigas la demandon en du partoj: 1-e Ĉu oni devas reformi la lingvon parolatan. 2-e Ĉu oni devas reformi la lingvon skribatan, t. e. la alfabeton de Esperanto?

La respondon al la unua demando: ĉu oni devas reformi la lingvon parolatan? ni trovas en la ĵus elirinta Majo-Junio-numero de L. K.

Kaj Prof. DE SAUSSURE, la kompetenta scienculo, kiu dum jaroj serioze kaj enfunde pristudis la internacilingvan demandon, respondas konvinkite: NE!

„Resume, al la demando, ĉu oni devas reformi la *gramatikon* de Esperanto? ni respondas senhezite: NE!” p. 35.

„Resume al la demando, ĉu oni devas reformi la *vortaron* de Esperanto? ni ankaŭ respondas: NE! — Sufiĉas, ke la Scienca Asocio Esp. daŭrigu doni konsilojn pri la diversfakaj vortaroj teknikaj, rekomendante eĉ kelkajn neologismojn por anstataŭi la nemultajn vortojn de U. V., kiuj havas formon neoportunan por la tekniko.” p. 37.

„Do, se la Ida sistemo estas uzata korekte, ĝi estas tro malfacila, kaj se ĝi ne estas uzata korekte tiam Ido ne estas pli preciza ol Esperanto.” p. 39.

„La derivado en Ido, diras S-ro ĈEFEĈ, vestas tiun lingvon per *perforta jako*. — Al tio mi aldonos: Hodiaŭ la derivado en Ido ŝajnas al kelkaj esti perfektigo de Esperanto, ĉar ili uzas Idon skribe; sed ju pli la Idistoj provos sian lingvon buŝe, des pli ili konstatos, ke lingvo estas uzota por interkompreniĝi, kaj ne por plenumi la principon de renversebleco.

„Kiu uzas la internacian lingvon ne nur sur la papero, ne nur por paroladoj *antaŭpreparitaj*, sed por la parolado *libera* kaj *improvizita*, tiuj scias, ke nur Esperanto posedas konstruon sufiĉe elastan kaj simplan por tiu celo, kaj ke la lingvoj tro aposterioraj aŭ tro logikaj estas allogiloj nur sur la papero.” p. 40.

„Ido preferas do tiun principon de renversebleco al la principo de minimuma penado, kiu estas la regnanta principo ne nur en Esperanto, sed en ĉiuj naturaj lingvoj.” p. 41.

„Estas facile pruvi, ke la principo de renversebleco helpas nur la *leganton* kaj ke ju pli ĝi faciligas la taskon de la leganto, des pli ĝi malfaciligas tiun de la parolanto aŭ skribanto.” p. 42.

„Resume, la Ida sistemo plifaciligas la taskon de la leganto, dum la Esperanta sistemo plifaciligas la taskon de la parolanto. La Esperanta sistemo do estas preferinda, ĉar la tasko de la parolanto estas pli malfacila, do pli atendinda, ol la tasko de la leganto. Sed ĉar preskaŭ ĉiuj Idistoj estas „legantoj” (de la gazetoj redaktitaj de kelkaj ĉefuloj), la plejmulto el ili sincere kredas, ke Ido estas supera je Esperanto. Ni donas al ili la konsilon, provi paroladi en Ido pri temo ne antaŭe preparita, kaj ili baldaŭ konstatos, ke la Ida sistemo de derivado estas tre ĝenanta, eĉ netolerebla, por la libera uzo de la parolo.” p. 43.

„Por montri la diferencon inter la Esperanta kaj la Ida sistemoj, ni faru komparon; la vorto *kulero* estas sufiĉe preciza, tamen ekzistas diversaj specoj de kuleroj: supkuleroj, desertkuleroj, tekuleroj k. t. p. Nu, imagu lingvon, en kiu oni ne rajtas uzi la vorton *kulero* tute sola, sed oni estus devigata, uzi nur la vortojn *supkulero*, *desertkulero*, *tekulero*, eĉ kiam la simpla vorto *kulero* sufiĉus por la kompreniĝo: tia estas la lingvo Ido. En tiu lingvo oni ne povas uzi la ĝeneralan adjektivan (aŭ verban) finaĵon, sen precizigi la specon de la adjektivo (aŭ verbo), eĉ kiam la kompreniĝo tion ne postulas.” p. 44. . . .

Sed oni legu la tutan dokumentitan artikolon de Prof. DE SAUSSURE. Sufiĉas por montri, ke scienculo riskas kompromiti sian sciencan reputacion, kiam li serioze proponas kiel sciencan fakton la, jam al la historio apartenantan, fabelon pri Ido kiel „plibonigita kaj simpligita” Esperanto!

D-ro S.